

Verschiĝnt maandelijks
Zeventiende jaargang
Nummer 4 (190)
APRIL 1950

Vertegenwoordiger in Nederland:
LEEN
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P.M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122 Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN:
* Leden: 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:
België: 60 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

Dokumenta Servo

KIO OKAZIS EN 1949?

Jarkroniko pri la Esperanto-movado.
(daŭrigo)

Pri « Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista » (I.K.U.E.) ni ne havas informojn koncerne 1949-an. En kongreso de « Nederlanda Katolika » s-ro A. F. Leideritz, parolante pri la situacio de la katolika movado diris i.a.: « ... I.K.U.E. ne floras. Dank' al la iniciato de kelkaj samideanoj « Espero Katolika » dum kelka tempo povis aperi. Nederlando havis en tio grandan rolon. En Drakenburg okazis en 1948-a kongreso de tre modesta karaktero. La kongreso en Dijon en 1949-a ne efektiviĝis. Por atingi pli bonan rezulton oni planis kunsidon en la kadro de la U.E.A.-kongreso ... » Laŭ raporto en « Esperanto » la kunveno de I.K.U.E. okaze de la U.E.A.-kongreso en Bournemouth komenciĝis per diservo, kiun ĉeestis centoj da personoj. En kunveno de landaj delegitoj kaj I.K.U.E.-estraranoj ĉeestis reprezentantoj el 6 landoj. Oni raportis pri la agado en la pasintaj jaroj kaj anoncis, ke en 1950-a okazos internacia katolika kongreso en Romo. « Espero Katolika » reaperis en oktobro 1949-a.

Universala Ligo (U.L.) celas eduki al mondĉivitaneco kaj por tio uzas Esperanton. Ĝi apartenas al la Mondmovado por Federalista Mondregistaro kaj sendis delegitojn al ties kongreso. La ligo eldonas organon « La Praktiko », kiu havas preskaŭ 1400 abonantojn. Okazis fakunveno de U.L. en la kadro de la U.E.A.-kongreso en Bournemouth kaj jarkunveno en Rotterdam, kiun ĉeestis ankaŭ kelkaj eksterlandanoj. Aperis en 1949-a almanako, kiu enhavas i.a. la adresojn de ĉiuj aktivaj membroj.

Internacia Scienca Asocio Esperantista » (I.S.A.E.) donis vivsignon per la aperigo de kvaronjara « Scienca Revuo », eldonata de J. Muusses en Purmerend (Nederland). Laŭ informo en la oktobra numero ĝi tiam havis jam pli ol 700 abonantojn. La nederlanda sekcio de I.S.A.E. nomiĝas A.N.S.E. (Asocio de Nederlandaj Scienculoj Esperantistaj).

Tutmonda Junular-Organizo (T.J.O.), pri kies membronombro ni ne estas informitaj, kongresis en 1949-a en Versailles. Proksimume 200 membroj el 7 landoj ĉeestis. T.J.O. eldonas organon « La Juna Vivo ».

Ankaŭ la instruistoj nun ree havas propran internacian organizon. Okaze de la U.E.A.-kongreso en Bournemouth la provizora internacia organizo transformiĝis en « Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj », kiu havas propran rubrikon en « La Juna Vivo ».

Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj (I.F.E.F.) havis internacian kongreson en Aarhus (Danlando). Partoprenis 130 personoj el 8 landoj.

G. P. de Bruin.

VERDLANDO VOKAS

Listo de radio-dissendoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Tempindiko laŭ la nederlanda (= mezeŭropa) hor sistemo. Flandroj kaj aliaj Greenwich-tempoj bonvolu depreni unu horon.

Mallongigoj: I = informoj. P = parolad(et)o. K = kurso.

Ĉiutage	15.45-16.00 Prago, 31,41 m. kaj 1935 m. : I.
	18.15-18.30 Parizo, 48,82 m. : I kaj P.
	19.45-20.00 Sofio, 39,11 m. : P.
	22.00-22.15 Prago, 49,92 m. : P.
Lunde	6.30- 6.35 Vieno, 506 m., 31 m., 41 m. : I.
	8.15- 8.30 Sveda Radio, 49,46 m., 27,83 m. : P.
	16.15-16.30 Sveda Radio, 19,80 m., 27,83 m. : I.
	17.30-18.00 Rio de Janeiro, 375 m., 30,71 m. : K.
	22.45-23.00 Prago, 470 m., 325 m., 259 m. : P.
Marde	2.15- 2.30 Sveda Radio, 49,46 m., 27,83 m. : I.
	12.55-1.00 Berno, 48,66 m., 31,46 m., 16,87 m. : P.
	18.35-18.40 Berno, 48,66 m., 31,46 m., 19,60 m. : P.
	(Ne la unuan mardon de la monato).
Merkrede	0.45- 1.00 Gvatemalo, 49 m. : I.
	14.20-14.35 Munĥeno, 405 m. kaj 48,70 m. kaj Nurnbergo, 315,8 m. K.
	(Nur ĉiuduamerkrede).
	20.15-20.30 Varŝavo III, 48,23 m. : I.
	22.45-23.00 Prago, 470 m., 325 m., 259 m. : P.
	23.00-23.45 Prago II, 270 m., 325 m. : « La Verda Stacio » dissendas sian tre aŭskultindan artoprogromon! (Nur la unuan merkredon de ĉiu monato!)
Juŝde	12.55-13.00 Berno, 48,66 m., 31,46 m., 16,87 m. : P. de d-ro Edmond Privat.
	18.35-18.40 Berno, 48,66 m., 31,46 m., 19,60 m. : P. de d-ro Edmond Prizat.
	23.00-23.10 Ostrava, 259 m. : I.
Vendrede	9.05- 9.20 Parizo, 386 m. : K. (Nur ĉiuduavendrede de 24-11-1950).
	15.30-15.45 Graz, 240 m. : K.
	16.40-16.55 Vieno, 228 m., 25 m., 31 m., 41 m. : I.
	(Nur ĉiuduavendrede!)


OOSTENDE, REĜINO DE LA BAN-URBOJ

atendas vin,
okaze de la XV-a Kongreso de Fl. Ligo Esperantista
(27-28-29 majo 1950)

Liganoj, nepre tuj aliĝu, por faciligi la laboron
de la Kongresa Komitato (sekr. S-ano Maeschalk, Muscartstr. 2.)

PROVIZORA PROGRAMO

SABATE :	15.00 h. Malfermo akceptejo, ŭbrostando FEI (Hotel STELLA MARIS).
	20.00 h. Malfermo Kongreso; balo kun diversaj dancoj, muzikludoj (LAITERIE ROYALE).
DIMANCE :	8.00 h. Malfermo de la akceptejo (Hotel STELLA MARIS)
	10.30 h. Oficiala akcepto fare de la Urbestro kaj jarkunsido F.I.L.E. (OUD OOSTENDE).
	13.30 h. Komuna tagmanĝo (Hotel STELLA MARIS).
	15.00 h. Promenado sur la digo kaj vizito al ban-esploroj.
	17.00 h. Kunveno Ligestraro.
	20.00 h. Esperanto-festo, prizorgata de sekcio BRUGGE kaj parolado de Dro MANDERS.
LUNDE :	9.00 h. Ekskurso sur la maro.
	11.30 h. Vizito al THERMAAL INSTITUUT kaj fotografado.
	12.00 h. Elskurso al BREDENE, vizito haveno kaj Fiŝ-aŭkcio.
	17.00 h. Oficiala fermo de la kongreso kaj adiaŭo.



Konferencjo « C. S Oolgaardthuis » en Arnhem, kie okazos la Benelux-aj someraj kursoj (vidu p. 3)

UNIVERSALA KONGRESO 5-12 AUG. EN PARIZO

Adreso: 35-a Universala Kongreso de Esperanto, 62 avenue de Clichy, Paris 18, France.

Kongresejo: La Sorbonne.

Jam aliĝis pli ol 1200 gesamideanoj el 30 nacioj! Se vi bezonas hotelĉambron en Parizo, frue aliĝu! LEEN aranĝos du karavanojn al Parizo nome vagonare kaj aŭtobuse. Informojn donas s-ro H. Bakker, van Tuyll v. Serooskerkenplein 33, I, Amsterdam-Z. F.I.L.E. aranĝos aŭtobuskaravanon por la membroj de Flandra Ligo Esperantista. Informojn donas s-ro F. Roose, Sabbeŝtr. 36, Brugge. La oficiala bulteno (numero 2, marto 1950) mencias multajn ekskursojn kaj donas detalajn informojn pri la loĝejoj, konkursoj kaj postkongresaj aranĝoj.

PROVIZORA KONGRESPROGRAMO

Sabaton 5-an de aŭg.

8.00 Malfermo de la akceptejo.
20.00 Interkonatiĝa vespero.

Dimanĉon 6-an de aŭg.

8.00 Katolika diservo.
10.00 Solena malfermo de la kongreso.
15.00 Evangelia diservo.
16.00 Boatveturo sur Seine.
17.00 Boatveturo sur Seine.

Lundon 7-an de aŭg.

9.00 Kunsidoj de la sekcioj.
14.30 Fakaj kunsidoj kaj ekskursoj tra Parizo.
20.30 Malfermo de la somera universitato.

Mardon 8-an de aŭg.

9.00 Kunsidoj de la sekcioj.
11.30 Akcepto en la urbdomo.
14.30 Fakaj kunsidoj kaj ekskursoj tra Parizo.
16.00 Somera universitato.
20.30 Internacia kongresa balo.

Merkredon 9-an de aŭg.

9.00 Somera universitato.
14.30 Fakaj kunsidoj kaj sportoj.
20.30 Distra vespero.

Ĵaŭdon 10-an de aŭg.

9.00 Ĝenerala kunsido.
13.30 Ekskurso al Versailles.
20.30 Somera universitato.
Vendredon 11-an de aŭg.
9.00 Literatura kaj oratora konkursoj.
10.00 Fakaj kunsidoj.
14.30 Fakaj kunsidoj kaj sportoj. Ekskursoj tra Parizo.
15.00 Boatveturo sur Seine.
20.30 Distra vespero.

Sabaton 12-an de aŭg.

10.00 Solena fermo de la kongreso.

La franca Radio ĉesigis, la 28 de februaro, la esperantajn radiodissendojn. Tuj skribu al la franca Radio, 118, Champs Elysées, Paris-8, por peti ke oni tuj nepre ilin daŭrigu.

Loka Kongresa Komitato.

AL HELSINGÖR (Danl.)

Kiel ĉiujare, la feriaj someraj kursoj de Helsingör okazos, en 1950, de 17.7. ĝis la 24.7. en la famkonata altlernejo, en rava ĉirkaŭo kaj vere internacia medio.

F.I.L.E. kaj LEEN kunlabore organizos aŭtobusan karavanon tien por, ne nur ebligi la partoprenon en la kursoj, sed samtempe montri al vi la plej interesajn lokojn de Danlando: ni citu veturojn al Kopenhago (ankaŭ vespere: Tivoli!), Schammlysbanku u (Kolding), la fama Hamleta kastelo Kronborg, alia belega kastelo Frederiksborg (Hilleröd), al Silkeborg (kun sia mondkonata Himmelbjerget), vizitoj de Helsingör, Kolding kaj Fredericia. Ni aldonu ke okazos ekskurso al Hälsinborg, multvizitata sveda urbo.

En Helsingör eblos al vi ĉeesti la kursojn gvidatajn de spertegaj instruistoj F-inoj Noll kaj I. Christensen (Danl.), S-roj T. Morariu (Svedl.), de Goeij (Nederl.).

Petu detalan cirkuleron kaj ĉiajn informojn al P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam O. (LEEN-anoj) kaj al la karavanestro, T. Van Ginderdaelen, Leopoldstr. 99, Mechelen (V.E.B.-anoj).

OBSERVOJ LA STUDANTO

FL. L. E.

ESPERANTO-HARINGO.



En multlegata Esperanto-gazeto mi rimarkis la bildon de du fervoraj gesami-deanoj, kiuj per motorciklo kun surskribo « Esperanto, la dua lingvo » propagandas sur la germanaj aŭtoseoj. Tre bone. Nur la surskribo ne taŭgas.

Kiam ni propagandas, ni celas la ne-esperantistan publikon, kaj tiun ni alparolu en lingvo kiun ĝi komprenas, ne en Esperanto!

La aserto, ke la nura vorto « Esperanto » jam efikas propagande, lamas. Tion mi spertis antaŭnelonge, kiam en la montfenestro de fiŝvendejo mi malkovris sekigitan kaj enpakitan haringon kun surskribo « Esperanto ». Tiu deklataĵo mi nepre deziris gustumi. Mi enpaŝis la vendejon kaj mendinte Esperanto-haringon, mi demandis la vendistinon, ĉu eble ŝi parolas Esperanton. Ofendite ŝi rigardis min kun riproĉaj okuloj, kvazaŭ mi riskis aprilan ŝercon en marto! Muta kiel fiŝo ŝi akceptis mian monon. Evidente, por ŝi Esperanto estas haringo — ne lingvo!

Iom da racio en nia propagando fruktigus niajn bonvolemajn, sed tro ofte diletantaj klopodojn...

PIK.

HET EI VAN COLOMBUS.

Het « Laatste Nieuws » (Brussel) schrijft : « Op een congres van wetenschapsmensen werd een voorstel gedaan om een woordenboek uit te geven met al de internationaal gebruikelijke uitdrukkingen. Deze wetenschapsmensen zijn van oordeel dat deze internationaal gebruikelijke uitdrukkingen de voorlopers zijn van een toekomstige algemene wereldtaal. Volgens de mening van de deelnemers aan dit congres is de tijd niet ver meer, dat deze wereldtaal in gebruik zal komen ».

Wij veroorloven ons één zinnetje commentaar : Esperanto bestaat reeds, en Amerika wordt niet voor de tweede maal ontdekt.

ESPERANTO BESTAAT

en geeft immerdoor levensblijken waarvan deze wetenschapsmensen blijkbaar niets (willen?) weten. Ze speuren en vorsen naar een wereldtaal en zien niet dat deze reeds in gebruik is, en wel op betrekkelijk grote schaal. Het volgende moge hun overtuigen :

Een esperantist uit Bolivië publiceert in een Esperantokrant een advertentie en ontving hierop 600 (zeshonderd) brieven en briefkaarten uit meer dan vijftig landen.

Inmiddels zoeken zeer hooggeleerde heren naar een middel om tot hetzelfde resultaat te kunnen komen!

ESPERANTO IN JAPAN.

Een verrassende vaststelling voor de nieuwe esperantist is de grote verbreidheid van het Esperanto in Japan, en hoeveel mensen in het land van de rijzende zon door middel van internationale taal in briefwisseling wensen te treden met het buitenland. Het aantal esperantisten is er aanzienlijk. De « Nippon Times » (een stelling niet pro-Esperanto georiënteerde engelse krant) spreekt van 50 à 100.000 esperantisten in Japan.

1.200 DEELNEMERS

hebben zich reeds gemeld aan het Comité van het Internationaal Esperanto-congres dat dit jaar in Augustus in de franse hoofdstad zal worden gehouden.

Nederlandaj poetoj en traduko

SOMERA PLUVO

(Zomerregen)

FR. H. MAADE-KUYPER

Pluvo dolĉe, kvazaŭ trete,
ekpaŝetas nudpiedete
tra vesper-kviet'.
Fingropinte delikate,
vice tuŝas rapid-glate
ĉion akveret'.

Pluvploretoj brilaj, bule
tremvojetojn strekas rule
dum laŭvitra fal'.
Lumileto de lanterno
larmrigardas al eterno
kun vizaĝa pal'.

Tegment-randaĝ gutofaloj
iĝas etaj pluvkanaloj.
Per marmura ĥor'
kantas defluiloj kortaj...
Vivaj staras aĵoj mortaj
en krepuska ĥor'.

trad. H. VERMUYTEN

Hier volgen de uitwerkingen van de opgaven in het vorige nummer :

1. Bonvolu doni al mi tason da teo kun multe da sukero sed sen lakto. 2. Precize je la dua horo li foriris kaj li diris, ke li forrestos dum du horoj sed li revenis jam post unu horo. 3. Ĉu vi legis en la gazeto pri la katastrofo? 4. Zamenhof laboris dum multaj jaroj pri (super) sia projekto de internacia lingvo. 5. Mia ĉapelo forflugis pro la vento kaj pendigis sur branĉo de dika arbo. 6. Li suferis pro reŭmatismo. 7. La dronanto kriis por helpo. 8. Li estis mokata de ĉiuj najbaroj, ĉar li rigardis sub sia digno saluti ilin. 9. Li iris kun fiere levita kapo, portante zonon ĉirkaŭ la korpo. 10. Mi konsilis al li resti hejme, sed malgraŭ la fakto, ke la pluvo falis torente el la ĉielo, li tamen eliris. 11. Mi kredis renkonti tie nur lin, sed krom li ankaŭ Johano troviĝis tie kaj mi do havis la okazon danki lin pro lia helpo. 12. La strato estis kovrita de neĝo. 13. La kuglo flugis preter la arbo kaj la pafisto maltrafis sian celon. 14. Ĉu tiu ĉapelo, farita el pajlo, apartenas al vi?

1. La kunveno decidis nomi la nunan kaston sekretario (bep. van gesteldheid. Gebruikt men kiel, dan wordt het : kiel sekretarion, want het woord na kiel staat in dezelfde naamval als het woord kaston, waar het bij hoort.) 2. Jam an-

venprove); ekhavi ideon.

Hier volgen enkele nieuwe opgaven :
Kompletigu la jenajn frazojn uzante la partipojn kun la ĝustaj finaĵoj :

1. Promen— sur la strato mi renkontis kelkajn neraz— virojn, nekone— de mi. 2. Kiu estas la verk— de tiu romano? 3. Li lasis fali du tasojn; unu el ili montriĝis rompiĝ—; la alia estis nur krev—. 4. La arbhakisto forbruligis la fallig— arbojn. 5. La ĵarkunveno decidis pri la urbo kie L.E.E.N. kongresos en la ven— jaro. 6. Li klopodis turni la renversig— boaton. 7. La sav— kore dankis sian sav— kaj donacis al li libron, acet— ĉe la libroservo de L.E.E.N. 8. Ĉu vi estas vizit— la kongreson de FL.L.E., okaz— je Pentekosto en Ostende? 9. Mi esperas baldaŭ ricevi la de mi mend— verkojn. 10. Fiere la sukces— kandidato montris al mi la ĵus ricev— diplomon. 11. La ĵugisto severe punis la mortig—. 12. La bankrot— komercisto pendigis sin per ŝnuro, far— el papero. Traduku :

1. Bij de opening van de nieuwe spoorweg waren vele autoriteiten aanwezig. 2. Hij haastte zich naar huis toen hij vernam, dat zijn vrouw plotseling ziek geworden was. 3. Oom en tante schreven ons, dat zij spoedig zouden komen. 4. Ik heb de kalender aan de muur gehangen. 5. Was ik zo rijk als hij, dan kocht ik een fototoestel. 6. De beide broers, die elkaar in tien jaar niet gezien hadden, verheugden zich over hun onverwachte ontmoeting. 7. Vroeger was de prijs van dat boek ongeveer drie gulden, maar de prijs is nu bijna een gulden hoger. 8. Deze roman wordt veel gelezen. Ik houd niet van romans; ik heb liever een stu-

MEDEDELINGEN VAN ONZE BOEKENDIENSTEN

Vrienden,

Verrikt Uw Esperanto-kennis door het lezen van een goed boek! Doet uw keuze uit één der onderstaande werken :

Moro de Trajno (detective-roman vlot geschreven)	f. 5.30	bfr. 63.—
La Dormanto Vekigás (H. G. Wells)	f. 3.10	bfr. —
Pro Iŝtar (oorspr. roman :)	f. 4.50	bfr. 61.—
Palaco de Danĝero (roman uit de tijd van Mad. de Pompadour :)	f. 3.50	bfr. 48,50
Leteroj de Zamenhof I-II (buitengewoon belangrijk !)	f. 8.55	bfr. 130.—
Skizoj pri Nederlando (mooi geschenk voor Uw buitenl. vrienden :)	f. 1.75	bfr. 34,50
Novaj E-Historietoj (gemakkelijke leerstof) :	f. 1.90	bfr. 22,50
Originala Verkaro de Zamenhof (een standaardwerk !)	f. 11.25	bfr. 152.—
Plena Vortaro (moet iedere Esperantist bezitten)	f. 11.40	bfr. 175.—
Esprimoj de Sentoj (E. Privat)	f. 0.80	bfr. 12.—
Komercaĵ Leteroj	f. 1.30	bfr. 14.—
Granda Aventuro (F. Szilagy)	f. 4.75	bfr. 55.—
La multkolora Libro (aangename leerstof)	f. 1.35	bfr. 18,50
Murdo en la Orienta Ekspreso	f. 1.00	bfr. 16.—
La Knaboj de Paŭlo-strato (M. Molnar)	f. 1.00	bfr. 16.—
Princino de Marso	f. 1.00	bfr. 16.—
Sep Vango-frapoj	f. 1.90	bfr. 30.—
La Virineto en Bluo (M. Stuttard)	f. 1.90	bfr. 30.—
Dro Dorner (alleen voor volwassenen)	f. 3.75	bfr. 49.—
Atentu, ĉiu acetanto ricevas en marto kaj aprilo donacon. Ju pli alta la faktura prezo, des pli multvalora la donaco!		
Nepre atentu niajn bagatelajn prezojn por insignoj :		
por butontruo	f. 0.35	—
broĉo, tutverda	f. 0.50	—

Porti voor koper. Bestellingen aan :

Boekendienst LEEN, Z-O-Singel 5, Bergen op Zoom (giro : 76915)
Vlaams E-Instituut, Diepestr. 44, Antwerpen (giro : 3268.51 ; Tel. : 244.30)

taŭ longa tempo la patro foriris; tamen li maltrafis la vagonaron. 3. Dum 24 horoj la tero turniĝas unufoje (unu fojon) ĉirkaŭ sia akso. 4. Mia frato kaj lia (nooit sia in het onderwerp zelf!) amiko hieraŭ vizitis (niet : estas vizitintaj) la muzeon. 5. Ni iru, aliokaze ni atingos la stacidomon tro malfrue. La vagonaro forveturos post duona horo. 6. Apenaŭ ni estis hejme kiam (kaj) ekpluvis. 7. Pala kaj laca li revenis malfrue en la vespero.

(U) soldato turnis sin al la kapitano, petante kelktagan forpermeson. « Mia edzino skribis al mi », li diris, « ke nunmomente la butikoj estas tiel multklienta, ke ŝi ne plu povas servi sola (bep. van gesteldheid) la klientaron. « Tio estas stranga », diris la kapitano, « kaj ĝuste hodiaŭmatene mi ricevis mallongan leteron ŝian (de ŝi) en kiu ŝi skribis, ke se ŝia edzo petus (petos) forpermeson por helpi ŝin en la butikoj, mi prefere ne donu ĝin, ĉar li ja nur malhelpos. » « Mi dankas » (dankon) diris la soldato, irante al la pordo. Apud la pordo li turnis sin dirante : « Mi petas pardonon, sinjoro kapitano. En ĉi tiu regimento troviĝas (estas) du mensoguloj. Mi bedaŭras, ke mi estas unu el ili. Mi ne estas edziĝinta ».

La provizo estas elĉerpita (forkonsumita); li estas bone informita; hieraŭ li frue levigis; mi nepre postulas tion; li ĝuste estis forironta; laŭ konsilo de; tute kaj plene; aldone; bankroto; garestari; mi estas tute elĉerpita (el)provi; acetil kredite; trafe maltrafe (di-

dieboek. 9. Zij die aan de excursie hebben deelgenomen, hebben veel genoten. 10. Het heeft gisteren de gehele dag geregend; wat zal het morgen voor weer zijn?

Por progresantoj :

Het is mij om het even. Hij verklaarde onder ede, dat hij niets gezien had. Onverminderd de gewone toelage kreeg hij nog een extra-uitkering. Sla daar je leerboek maar eens op na. Ik zal je er te gelegentijd wel aan herinneren. Hij is Esperantist in hart en nieren. Dag in, dag uit vertelt hij hetzelfde. Kinderen beneden de tien jaar betalen half geld. Houd je er buiten! Blijf van de spiegel af! Dat gaat alle perken te buiten! Zijn plan is in duigen gevallen. Naar zijn uiterlijk te oordelen geloof ik, dat hij een vreemdeling is. Hij was op een na de laatste. Om de andere dag kom ik hem tegen.

1. Hij gedroeg zich erg vreemd; een bouquet verwelkte rozen zette hij in een emmer vol koffie. 2. Hij vertelde me, dat de man, die men om zijn verstrooidheid de professor noemde, zijn oom was. 3. Het scheelde niet veel of hij had de trein gemist. 4. Je treft het dat je me thuis treft, want ik zou juist uitgaan, toen je belde. 5. Onbekend met de hem bedreigende gevaren ging hij ongewaapend op reis. 6. Wat hem overkomen is, heb ik gisteren in de courant gelezen.

De inzenders kunnen het werk van de correctoren gemakkelijk door slechts de rechter helft van het papier te beschrijven, zodat de linkerhand benut kan worden voor het zo nodig bijvoegen van verklarende aantekeningen.

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten vóór 20 April aan V.E.B., Studanto; postbus 342, Brussel; van Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

En la Marta numero de « Esperanto » de U.E.A., la bone konata Dro I. Lapenna tre klare resumis la ĉefajn mankojn de nia Esperanto-organizado laŭ la impresoj kolektitaj de li dum la vojaĝo tra Francujo. Tie Dro Lapenna konatigis kun plej diversaj grupoj kaj kontaktis Esperantistojn, havantajn la plej diversajn konceptojn pri organizado kaj propagando.

Ni citas la konkludon el tiu artikolo :
« Jen, tie kuŝas nia malforto : troa individuismo; manko de memdisciplino kaj organiziteco; manko de veraj, funkciaj societoj; manko de fortaj kaj aktivaj propagandaj centroj; manko de profunde ellaborita laborplano. »

Multaj gvidantoj jam konsilis pri tiuj faktoj; sed oni malhonorigis ilin dirante ke ili tial estas kulpaj, ĉar ili faris malmulton aŭ nenion por plibonigi tiun fi-situacion.

La spertoj malkaŝas ke, tie kie laboras bona, organizema gvidanto, kun sufiĉa lingvo-kono, ni jes havas veran, funkciajn societon kaj disponas pri aktiva propagandcentro. La spertoj konfirmas, ke nia movado ne havas sufiĉe da bonaj gvidantoj. La kialoj estas diversaj, sed ni certe konvinkigis pri unu : al ĉiu aktivulo en nia movado mankas tempo; se ni nur sporade renkontas veran pioniron, estas ĉar la vivbatalo forlogis post kelkaj jaroj de aktiveco al junajn batalantojn.

Facile oni tuj trovas la solvon : oni liberigu kiel eble plej multe da aktivuloj de ilia ĉiutaga laboro, kaj ili ricevu salajron de la Esperanto organizaĵoj. Tio postulas monon. Kaj ni kolektas monon pere de kotizoj. Sed eĉ U.E.A., la centra organizo, nur enspezas sufiĉe por vivteni sin. Troa individuismo, manko de memdisciplino kaj organiziteco, prave diras Dro Lapenna. Ĝi estas vera je internacia skalo, sed same vera el landa vidpunkto. Ni rimarkas ekz. ke en Nederlando, kun abundaj asocioj, tamen multaj Esperantistoj ne aliĝas al iu el tiuj societoj kaj restas sendependaj. Ekzemple : F.E. marta numera, paĝo unu : jarraporto de la ekzamena komitato 103 kandidatoj ricevis la diplomon A, kaj 29 de ili ne membriĝis al iu de la kvar grandaj nederlandaj asocioj : F.L.E. — L.E.E.N. — N.C.E.V. En nia lando, kie la nombro de verdstelanoj estas relative malgranda, ni konstatas unue ke du societoj agadas sur la sama tereno kaj plie, ke multaj esperantistoj ne aliĝas al unu el tiuj du. Kiel klarigi tiun sintenon? Diversajn eksplikojn ili certe disvolvos, se oni petus al ili la kialon.

Bedaŭrinde, tiaj Esperantistoj ne nur ne havas signifon, por la propagando kaj la disvastigo de nia lingvo, sed ili estas balasto, ĉar ilin ni ne plu povas envicigi, kontraŭe al eksterstaranto, kiu ĉiam povas interesiĝi pri Esperanto.

Ni konkludas :

1. Estas nia devo konvinki ne-organizitajn Esperantistojn pri la absurdeco de ilia sinteno; ni tro malmulte propagandas inter samideanoj.
2. Estas nia devo aliĝi al U.E.A. se eblas kiel membro-abonanto, sed nepre kiel membro kun jarlibro.
3. Statistikoj pruvas ke malmultaj samideanoj restas fidelaj dum pli ol 5 jaroj. Ĉiam estas granda alfluo de novaj gemembroj, sed same granda forkuro de dizertuloj.

Ni petas, kara liganaro, promesu nun al vi mem ke almenaŭ vi restos en niaj vicoj, por ŝtopi la truon en la Esperanto-digo.
via sekretario.

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo kostas : g. 0,05 aŭ bfr. 0,75. Minimume : g. 1.— aŭ bfr. 15.—

S-ro Walfrid Wollin, Torggatan 1, Skövde, Svedujo deziras interŝ. poŝtm. kun seriozaj filatelistoj. Rekomencos per pm. el Svedujo, Norvegujo, Finnlando kaj Islando.

Al Finnlando

kun dana E-ista karavano 26-7 — 10-8. Detalajn informojn sendas L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhoj, Danlando.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. « LA ESTONTO ESTAS NIA »

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst :
Mr. A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, Tel. 96160.
Penningm. : P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postr. 34563.
Boekendienst : H. A. Appel, Z.O.singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
Bibliotheek : E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst : H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Schr. cursus v. gevorderden, examen B: H.A.Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.
Alg.Ned.Esp.Examen-comm.: Mej.H.M.Mulder, Zilvermewuustr. 29, Badhoevedorp
Cefdel. U.E.A. : P. Moen, Schaarbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

Car la presisto de nia gazeto ne agis laŭ niaj deziroj sed propra-iniciate aranĝis la ekspedon de la marta numero de « Nederlanda Esperantisto », pluraj anoj niaj tute ekster nia kulpo ricevis tiun numeron nur en la dua duono de la monato. Ni afable petas pardonon !

La ĝen. kasisto afable petas la ĝeneralajn anojn ĝiri la jarkotizon por 1950 (g. 4,—) aŭ almenaŭ la duonon por la unua duonjaro en poŝtkonton 34563 de « Ned. Esperantistan-Vereniging L.E.E.N. ».

Flandra Ligo Esperantista kaj LEEN aranĝos Beneluksan aŭtobuskaravanon al la feriaj kursoj en Helsingör (Danlando). L.E.E.N.-anoj, kiuj deziras partopreni, turnu sin al s.ro P. M. Mabesoone, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O.

Tiuj, kiuj karavane (aŭtobuse aŭ vagonare) deziras vojaĝi al la Pariza kongreso, petu informojn de s-ro H. Bakker, van Tuyl v. Serooskerkenplein 33, I, Amsterdam-Z.

Sekcio Haarlem kandidatigis kiel prezidanton de L.E.E.N. s-ron H. J. Blokker el Heemstede.

EKZAMENOJ 1950

Okazos ekzamenoj por A kaj B, ĉielirtagon, la 18-an de majo en Amsterdam kaj Zwolle kaj sabaton la 10-an de junio en Hago. Por la ekzamenoj je ĉielirtago oni anoncu sin kiel eble plej baldaŭ ; por la ekzameno en Hago antaŭ la fino de Aprilo. Petu senpagan detalan prospekton de la ĝen. sekretario de L.E.E.N. aŭ de la sekretario de la ekzamena komitato, f-ino H. M. Mulder, Zilvermewuustrat 29, Badhoevedorp.

L.E.E.N.-anoj !

Je Pentekosto ĉi-jare Flandra Ligo Esperantista kongresos en Oostende. La pasintan jaron pluraj L.E.E.N.-anoj ĉeestis la flandran kongreson en Gent kaj tie pasigis kelkajn agrablajn tagojn kun siaj flandraj gesamideanoj. Komprenoble ankaŭ ĉi-foje oni atendas plurajn nederlandanojn. Do, se vi deziras pasigi vian Pentekostan ferion en Esperantujo, vi nepre aliĝu al la flandra kongreso ! Niaj flandraj geamikoj gastame akceptos vin kaj tre ŝatos vian ĉeeston ! Informojn volonte donos al vi la Sekretario : S-ro MAESCHALK, Muscartstr. 2 OOSTENDE.

A. J. Kalma.

Responde al nia sugesto en la novembra numero sekcio Boskoop donacis g. 10,— al la L.E.E.N. kaso. Ni jam menciis tion en la januara numero, kiun niaj anoj ĝis nun ne ricevis. Ankaŭ sekcioj Arnhem kaj Amsterdam respondis al nia alvoko per mondonacoj resp. g. 5,— kaj g. 50,—. Koran dankon al la donacintoj !

PROPONOJ POR LA JARKUNVENO

Kvankam la kongreso en Groningen verŝajne jam okazis en la momento kiam ĉi tiu gazeto atingas niajn anojn ni tamen informcele publikigas ankoraŭ du proponojn, kiuj venis tro malfrue por esti menciataj en la marta numero :

Sekcio Haarlem proponas, ke la ĉefestraro esploru la eblon reveni al propra organo.

Klarigo : En gazetaj aferoj ne estas eble « kunlogadi ». Ni scias, ke la malfacilaĵoj, precipe la financaj, por efektiviĝi eldonon de propra gazeto estas multaj. Estas laŭdirinde, ke la ĉefestraro ĝis

nun ne altigis la kotizon, sed la intenco ne altigi la kotizon fakte ne plu estas subtenebla.

Opinio de la ĉefestraro : Se iel eble ni nepre evitu plialtigon de la kotizoj. Kotizplialtigo rezultigos eksigon de pluraj anoj, la eldonkvanto de la gazeto pro tio malaltigos, do la prezo altigos ! La sperto pruvis, ke « kunlogado » certe estas ebla ; ni scias, ke okazis multaj malagrablajoj, ekz. la konfisko de la januara numero kaj la oftaj malfruigoj sed pri tiuj malagrablajoj ne kulpas Flandra Ligo Esperantista, sed nur la presisto kaj ni jam nuligis la kontrakton kun li.

Sekcio Hoogezand-Sappemeer proponas ke la ĉefestraro turnu sin al « Nederlandse Vredesbeweging » por esplori kiel ambaŭ organizoj povos kunlabori por la paco kaj kontraŭ ĉia militpreparo kaj ke la ĉefestraro estigu kontakton inter la nederlandaj Esperanto-organizoj por prepari la batalon por la paco kaj malhelpi militpreparon.

Opinio de la ĉefestraro : Kvankam verŝajne multaj anoj simpatias kun ĉi tiu propono, par. 2 de nia statuto ne permesas ĝian pritrakton.

SOMERAJ KURSOJ 1950

Jam en la marta numero ni komunikis, ke la someraj kursoj, organizitaj de « La Estonto Estas Nia » kaj « Flandra Ligo Esperantista » okazos de 27 julio — 3 aŭgusto en « Oolgaardthuis » en Arnhem. Kursgvidos s-ino A. M. v. d. Wal-Brethouwer (Nederlando), ekzamenantino en la Nederlanda Ekzamena Komitato ; s-ro d-ro Th. v. Gindertaelen (Belgujo), redaktoro de « Flandra Esperantisto » ; s-ro A. Weide (Germanujo), konata instruisto, kiu jam antaŭ la milito gvidis diversajn kursojn laŭ rekta metodo i.a. en Groningen kaj s-ro C. B. Zondervan (Nederlando), Esperanto-profesoro ĉe la ŝtata seminaro por ĝinstruistoj.

Planitaj estas kelkaj interesaj duontagaj ekskursoj i.a. al la granda ekspozicio « Mejløstøno 1950 », al la subĉiela muzeo kaj al kastelo Rozendaal. La kotizo (g. 36,—) inkluzivas la restadon dum la tuta kurso, ĉiujn manĝojn kaj la ekskursojn. Vespere okazos kelkaj prelegoj i.a. de f-ino A. D. Tusveld pri hejma vivo en Japanujo kaj de d-ro W. J. A. Manders pri lingva temo. Deklamos s-ino E. Köhler-van Ghelder. Komencintoj kaj progresantoj, kiuj deziras pliperfektigi sin en konversacio, gramatiko kaj literaturo kaj samtempe pasigi agrablan kaj malmultekostan ferion en Esperantujo meze de internacia rondo de samideanoj, petu senprokraste la detalan senpagan ilustritan prospekton, enhavantan ĉiujn deziratajn informojn de s-ro C. B. Zondervan, Sweelinckstraat 2, Deventer. Ĉiuj pagoj pere de poŝtgirkonto 70215 de « Administrateur Zomer-Cursus L.E.E.N., Sweelinckstraat 2, Deventer ».

KRISTANA KONFERENCO

De 29a de Julio ĝis 5a de Aŭgusto, okazos en ĉarma vilaĝeto de Pariza regiono la tria kristana semajno organizata de Kristana Esperantista Ligo Internacia. La bieno, kie ĝi okazos, situas apud la fama arbaro de Fontainebleau, la plej rava en Francujo. Pluraj ekskursoj estos aranĝataj al plej pentridaj francaj pejzaĝoj ; krom tio, estos ankaŭ interesaj prelegoj kaj diskutoj, bibliaj studoj, ludoj, muziko, kantoj, ktp. La du antaŭaj renkontiĝoj, en Svedujo kaj Nederlando, estis brilaj sukcesoj ; nu, la Francoj esperas fari pli bone. Estas deo de ĉiu kristana esperantisto partopreni, se eble, tiun jaran kunestadon, sur vojo al Universala Kongreso en Paris.

Aliĝoj kaj informoj : Victor Demoulin, rue Bayet, 40, Charleroi.

Niaj Kongres-urboj

GRONINGEN
Paskon 1950

OOSTENDE
Pentekoston 1950

Kiu ne konas GRONINGEN,
ne konas NEDERLANDON.

Ostendo, Hidropolo Baneja
de Sro Dro Ed. Moreaux,
Urbestro de Ostendo.

En la jaro 1040 oni renkontas por la unua fojo en la historio la nomon GRONINGEN. Tiam ĝi estis ankoraŭ vilaĝo, situanta sur la norda finajo de longa monteta altaĵo, formita de la glaci-riweregoj, kiuj antaŭ multaj jarmiloj venis el la nordaj regionoj de Eŭropo. La ĉirkaŭaĵo estis kaj estas malalta ; kaj en tiuj tempoj certe la maraj alfluo atingis Groningen. Ankoraŭ ne estis konstruitaj la digo, kiuj nun ŝirmas la malaltajn regionojn kontraŭ la maro.

En 1227 grandega brulo ruinigis la pli grandan parton de la urbo, akcidento, kiu ofte trafis mezopokajn urbojn, kies domoj ja grandparte estis konstruitaj el ligno.

La mineralakvo de Ostendo elsprucas en la Leopoldo-Parko, el arteza puto borita en 1857, kies profundo atingas 306 metrojn.

La akvaro — laŭ sia konsisto : vulkandevena — elvenas el la unua-epoka grundo kiu, en tiu profundo, konsistas el violkoloraj « phyllades cambriens » !

Akiritu dum iamaj esploradoj, celantaj la akvoprovizigon de la urbo, — problemo solvita ekde 1923 dank' al alkonduko de la fontakvo Bocq-Hoyoux — ĝi estis longtempe malŝatata.

Oni riproĉis al la akvo ĝian hazardan eltrovon, kiu tamen ne malgrandigas ĝian valoron. Oni krome kritikis la teknikon utiligintan vertikalan kondukilon.



« Mail »-ŝipo, ligilo inter Oostende Dover.

Proksimume en 1600 oni fosis la « grahtojn » kaj konstruis la murojn ĉirkaŭ la t.n. « malnova urbo ».

Meze en la urbo estas « Grote Markt » (Granda Vendplaco). Tiu placo estiĝis el malnova « Brink » (herbeja placo ĉirkaŭita de arboj), kiun oni ankoraŭ trovas en ĉiuj vilaĝoj en Drente, la provinco situanta sude de Groningen. Tie imponas la Urbdomo, konstruita en 1810.

En la mezepoko Groningen fariĝis grava komercurbo, ne nur por la ĉirkaŭaĵoj, sed ĝi havis rilatojn ankaŭ kun la landoj ĉirkaŭ Norda kaj Baltika Maroj. Ĝi apartenis al « Hanze », la tiam ekzistanta ligo de komercaj urboj en Germanujo.

La farmistoj loĝantaj en la ĉirkaŭa regiono venis (kaj ankoraŭ venas) al la urbo por vendi siajn produktojn. Post fosado de kanaloj en diversaj direktoj, Groningen pli kaj pli fariĝis la granda urbo de norda Nederlando.

Sed ne nur el komerca vidpunkto ĝi estas tia, ankaŭ kiel kultura kaj scienca centro ĝi fariĝis la plej grava.

En 1614 estis fondita la Universitato, baldaŭ tre fama ankaŭ en eksterlando. En ĉi tiu jarcento instruis en ĝi la filozofo Heymans kaj la mondfama astronomo Kapteyn.

La ĉefa konstruaĵo ĝi estas la tria depost 1614 konstruigis en la jaroj 1912-1914, post kiam en 1906 la antaŭa brulruinigis. Ĝi enhavas aŭlon kun murpentraĵoj, kaj ŝtuparan halon kun emajlpentritaj fenestroj.

Krom ĉi tiu Akademio estas aro da institutoj kaj laboratorioj, dissemataj en la urbo. La granda malsanulejo (ankaŭ parto de la Universitato) estis konstruita post la malkonstruo de la fortikaĵoj (inter 1870-1880). Rezulte de la malapero de la defendmuroj la urbo povis kreski.

Enhavante 30.000 loĝantojn en 1830, ĝi nun estas urbo kun 130.000 anoj.

Belajn novajn kvartalojn oni fondis precipe en la orienta parto.

Timigajn tagojn travivis la enloĝantoj en la jaro 1672, kiam la Episkopo de Münster sieĝis la urbon, sed la urbanoj venkis kaj 28-VIII-1672 la episkopa armeo estis for. Ĉiujare oni festas ĉi tiun gravan daton.

Samspecajn tagojn la nuna generacio spertis en la tagoj de 14-16 Aprilo 1945, kiam la kanada armeo forpelis la germanojn el la urbo. Pro venĝo ili ekbruligis i.a. tri flankojn de « Grote Markt », kio kaŭzis la ruinigon de multaj belegaj renesancaj domoj. Ankoraŭ oni trovas tie grandan vundon en la koro de la urbo.

Diversajn preĝejojn oni trovas ĉie en la urbaj kvartaloj. La plej granda estas la Martini-preĝejo, kies turo havas altecon de 96 metroj. Rimarkindaj estas ankaŭ la maljunulejoj ; ĉirkaŭ malgranda korto kuŝas la dometoj, en kiuj la gemaljunuloj loĝas, aparte aŭ duope. Belaj pordegoj, tra kiuj oni eniras tiujn pitoreskajn kortojn, samtempe apartigas tiujn ripozejojn de la brua urbo.

Multnombraj tamen estas la artezaj akvoj, kiuj havas vertikalan kondukilon, tute same ĉu ili elsprucas ĉe la supraĵo (Châtelguyon, Vals, Alet, Vittel, Contrexéville, Tepłitz, La Bourboule, Royat) aŭ ĉu ili estas sen natura elfluo (St. Yorre apud Vichy) aŭ ĉu temas pri subteraj akvorezervoj hazarde renkontitaj dum esploradoj minaj aŭ aliaj (Mondoy, Montond, Kissingen, Ostendo) cetero.

Kiel ĉi tiu tekniko, racie aplikita, povus aliigi la kvalitojn de la akvo ?

Sed nu oni demandas, ĉu la arteza puti estis racie fosita ? Ĉu la profundan akvaron ne degenerigas la akvoj survoje renkontitaj, kiuj pro rompiĝo de kondukilo, sin miksas en ĝi.

Fundamenta konstato tiurilate forigas tiujn ĉiun dubon : la rimarkinda konstanto de la fizikaj kaj ĥemiaj ecoj, konstatebla en niaj mineralaj akvoj ĉe la elfluo.

La arteza akvo estas unueca, ĉiam sama, kaj tio permesas al ni klasifikigi ĝin kaj difini ĝiajn terapiajn ecojn kaj ĝiajn aplikojn.

La analizo farita en 1905 de Prof. A. Gautier kaj Moureu estis rekomencata en 1910 de Sroj Moreaux kaj Everaerts, komisiitaj de la urba higiena laboratorio, ĉela konstato pri enhavo de sulfido.

La artezaj Ostendaj akvoj — Parkfonto — estas malvarmaj kaj radioaktivaj kun natria bikarbonato, klorido kaj sulfido, krome iŭtia klorido kaj natria baborato. Ili karakterizas du rimarkindaj faktoj : la foresto — preskaŭ komplete — de kalko kaj la riĉeco je bora acido.

La raporto de Sroj Gautier kaj Moureu diras :

« Oni trovas akvon enhavantan preskaŭ neniun kalkon, oni ankaŭ trovas akvon enhavantan boran acidon, sed oni konas nenian akvon kiu posedas samtempe ĉi tiujn 2 kvalitojn : esti pli boracida ol la Souzmat't'a akvo kaj enhavi preskaŭ neniun kalkon. Sekve ni povas konkludi ke la arteza akvo de la Ostenda parko ne estas absolute komparebla al la konata minerala akvo. »

La uzadmanieroj estas plej diversaj : la akvo utiligas kiel trinkaĵo, por irigacioj, gargaroj, enspiro, pulvorigado, banoj laŭ medicina recepto kaj por jenaj malsanoj : malsanoj devenaj el malrapidiginta nutrado (artritismo, trograseco, diabeto) ; malsanoj de la digestorganoj kaj kronike gener-urinaj : anemio, limfeco, « herpetismo » ; haŭt- kaj mukozmalsanoj ; kronikaj faring- kaj laringmalsanoj.

Kontraŭindikoj : tuberkulozo, spinmalsano, al kiuj ekskluzive konvenas markuracado.

La akvo estas estrata en la Trinkhalo de la Leopoldo Parko, kie ekzistas banĉeloj, alireblaj por la publiko dum la tutjara.

Ĝi ankaŭ estas havebla, ĉu natura, ĉu iomete gasigita, en la apotekoj kaj spicvendejoj, kaj en la ĉefaj kafejoj kaj restoracioj k.t.p.

(daŭrigota)

